n-ro 91

aprilo 2006

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Jarraporto kaj Ĝenerala Kunveno

Ĉi tiu numero de La Merkato - ekde nun duonjara revueto - enhavas la raporton pri la pasinta jaro 2005 kaj la unuajn informojn pri la IKEF-aranĝoj dum la ĉijara universala kongreso.

IKEF en Florenco partoprenos al la 'movada foiro' je la komenca sabato, vespere. Por la dumkongresa Ĝenerala Kunveno estas rezervita salono dum du horoj. Krom diskuto pri kaj aprobo de la jarraporto, (re)elekto de estraranoj kaj ĝenerala diskuto, ankaŭ estas invito por intervenoj pri la kongresa temo: 'Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo'. Nia itala membro kaj revizoro, d-ro Polerani, esploras, kun helpo de kongresurba kolego, la eblecojn por la tradicia IKEF-vizito al komerca ĉambro aŭ simila instanco. Detalaj informoj kaj horaroj legeblos en la IKEF-retpaĝaro (www.ikef.org, www.ikef.net, www.ikef.info).

## Enhavo

Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2005 . . . . . . . . . . . . . . . . 3-5, 8-9
Membro-informoj - Novaĵoj de la Eldona Oficejo de EU . . . . . . . . . . . 5
Reti en Esperantujo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6-7, 10
Serbio: Kiel komenci propran laboron - Foiro de laborlokoj . . . . . 11-13
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 13
Komercaj petoj kaj proponoj - Jura Vortaro . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 14
La Stelo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 15



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi. **Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo:+32-50-330004; reto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). [Tarifoj provizore duonigitaj ekde fino de 2005.] Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2005**

Administrada enkonduko

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj la raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2005 kaj proponas aprobon de tiu raporto. La revizoro. D-ro Polerani, je la 12a de marto 2006 komunikis ke li juĝas la spezokonton kaj bilancon en ordo.

2. La estraro notas la sumon de financa neta gajno de 265,15 eŭroj kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.

3. La estraranoj Wang kaj Kurz, elektitaj en 2004, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la Statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ambaŭ pretas denove kandidatiĝi, kvankam d-ro Rainer Kurz rimarkas ke, pro la tempo kiun li devas dediĉi al sia entrepreno, ne restos multe da tempo por IKEF. Aliaj kandidatoj por la estaro bonvolu sendi sian kandidatiĝon plej laste fine de junio al Roland Rotsaert, por ke li povu komuniki ĝin per la IKEF-retpaĝoj.

4. Nia Statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la raportoj pri agado kaj financo. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la 91a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco, Italio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu erojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu eron 4 supre) okazos tie.

5. Membroj kiuj ne povas veni al Florenco, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos tra la retpaĝoj.

La Estraro de IKEF

Ĝenerale

La plej menciindaj agoj de IKEF dum la pasinta jaro estas la Ĝenerala Kunveno je la 26a de julio 2005 kaj la vizito al la Industria, Komerca kaj Metia Ĉambro de Vilnius je la 28a de julio 2005, ambaŭ en la kadro de la Universala Kongreso de Esperanto.

Post la demisio de Franz Josef BRAUN kiel prezidanto kaj sekretario, la IKEF-estraro konsistas el Roland ROTSAERT, Belgio, Financa Konsilanto (kaj redaktoro de La



Merkato); D-ro Achim HORNECKER, Germanio; Silvio KNIESS MATES, Brazilo; D-ro Rainer KURZ, Germanio; Prof. OOBA Atsuo, Japanio; WANG Tianyi, Ĉinio.

La revueto ‘La Merkato’ dum 2005 ankoraŭ aperis kvarfoje. Pro manko de kontribuoj kaj por ne sen neceso elspezi monon, la redaktoro planas estonte nur du numerojn jare. Al membroj kiuj deziras tion, La Merkato estos sendata rete (kiel .pdf-dosiero) aŭ al ili estos sendata informo ke nova numero legeblas je la IKEF-retpaĝoj.

Fine de la jaro evidentiĝis ke la adreso www.ikef.org kaj la IKEFa forumo, ambaŭ mastrumitaj de IKEF-membro, ne plu estis alireblaj. En marto 2006 www.ikef.org denove iĝis alirebla; estas promeso ke ankaŭ la forumo baldaŭ refunkcios. La adresoj www.ikef.net kaj www.ikef.info, registritaj de IKEF mem, restis daŭre alireblaj.

Ne estis novaj iniciatoj rilate al terminologia laboro aŭ eldonoj. Alvoko por varbi komercajn reklamojn por la revuo Monato ne liveris rezulton. IKEF nun havas 101 membrojn.

Financoj

La spezokonto kaj bilanco aperas en la mezaj paĝoj de ĉi tiu numero. Al la revizoro estis senditaj la detalaj librotenaj dokumentoj. Li komunikis sian aprobon je la 12a de marto 2006.

La ricevitaj kotizoj, kiuj iam atingis 1500 eŭrojn, ŝrumpis al 1000 eŭroj, sekve de la malkreskanta membraro. Tamen, ĉar ne estis elspezoj pro terminologiaj kaj eldonaj projektoj, finfine la spezokonto montras pozitivan rezulton je 265,15 eŭroj.

Pro la duonigo de la aperritmo de La Merkato - preskaŭ la sola servo de IKEF - kompense ankaŭ la kotizpagoj estis duonigitaj. La kelkdekaj membroj kiuj antaŭpagis kotizon por unu aŭ pluraj jaroj ricevis laŭan plilongigon de sia membreco. La atendataj enspezoj kaj la rezervoj sufiĉas por garantii la funkciadon de IKEF ĝis venas nova elano.

La nura grava elspezo - krom La Merkato - estas la membreco de UEA, kiu konsistigas preskaŭ la tuton de la 'ĝeneralaj kostoj'. Malgraŭ la alta sumo, ĝi restas pravigebla, ĉar ĝi rajtigas je senpaga salono okaze de la universalaj kongresoj.

Estonto

Dum la komenca tago (sabato vespere) de la UK en Florenco, IKEF, kun multaj aliaj E-organizoj, prezentos sin dum foiro. Helpantoj estos bonvenaj.

Dum 2006 estu realigata la delonge atendata nova (reta) adresaro, kiu povos anstataŭi la iaman 'identecŝildaron'.

La revuo ‘Monato’ planas plian kampanjon por varbi komercajn anoncojn. Por tio ĝi fidos je kunlaboro de IKEF-anoj.

Pri novaj terminologiaj projektoj ĝis nun ne estas informoj. Komence de 2006 IKEF disponigis la ankoraŭ troveblajn partojn de 'Pekoteko', iama terminologia projekto de Rüdiger Eichholz, je http://users.pandora.be/ikef/pekoteko.html.

**Membro-informoj**

Realiĝo

274. S-ro ZHANG Ci, Materialo Scienco kaj Konstruo Fako, Fervojo Instituto, Bei-er-huan-dong-lu, CN-050043 Shijazhuan, Ĉinio, rete zhangci1967(a)yahoo.com.cn

Korekto de adreso

344. S-ro Damir MIKULIČIĆ , Trnjanska **47**, HR-10000 ZAGREB

Novaj membroj

347. S-ro MON-DIEU Siméon Apollinaire, B.P. 4573, TD- D'DJAMENA, Ĉadio (Tchad), °1973, retadreso apollo_012(a)yahoo.fr, portebla (235)24-78-89.

348. S-ino Stella DE WEERDT, Sierkerslaan 17, BE-2940 Stabroek, Belgio

**Novaĵoj de la Eldona Oficejo de la Eŭropa Unio**

- Centra katalogo (kun mendo-ebleco) de ĉiuj EU-eldonoj nun estas je http://bookshop.eu.int.
- La kompleta EU-leĝaro (senpage konsultebla kaj traserĉebla!) troviĝas je http://europa.eu.int/eur-lex/lex/.
- Informoj pri adjudikoj estas je http://simap.eu.int/ (por sendi informojn por publikigo) kaj je http://ted.publications.eu.int/ (por konsultado).

Principe la paĝoj estas multlingvaj, kvankam eblas ke lingvo de iu nova membro-ŝtato ankoraŭ mankas.



**Reti en Esperantujo**

Kio estas reto? Fakte ĉiu havas ĝin. Familio, geamikoj, ĉiuj kiujn vi konas apartenas al via reto. Esperantistoj estas kompreneble bonaj retantoj. Ili konstruas ĉirkaŭ sin larĝan cirklon de amikoj kaj konatuloj – ofte internacian – al kiuj ili ĉiam povas turni sin por bona konsilo. Tiu ĉi retado plejofte okazas nekonscie; ĝi ja ne estas celo. Tiu ĉi artikolo celas pli komercan difinon de reti. Taŭga difino povus esti:

> *La sistema, planita kaj preparita procezo de la kontrolo de ekzistantaj konatoj kaj interrilatiĝo kun novaj konatoj, tiel ke ĉiuj personoj povas uzi sian reton por atingi privatajn kaj komercajn celojn.*

Reti havas diversajn avantaĝojn:

- Pli granda efikeco kaj produktiveco. Vi pli rapide disponas pri pli bona informo kaj konsilo.
- Malpli da streso. Vi ja scias kiu povas helpi vin ĉe specifa problemo aŭ kiu povas pludirekti vin.
- La necerteco iĝos malpli granda, via animstato iĝos pli ekvilibra kaj vi sentas vin pli sekura. Vi ja ĉiam scias ke vi ne devas fari ĉion sola, ke vi ĉiam povas apelacii al aliuloj.
- Pli bonaj (profesiaj) amikecoj kaj interrilatoj. Helpi kaj esti helpata pliprofundigas la interrilaton.
- Enuiga tasko povas iĝi agrabla se vi povas fari tion kune kun aliaj personoj.
- Estas kontentige povi helpi aliulojn. Donado plifortigas la memkonscion. Krom tio pligrandiĝos via imago: aliaj personoj vidos vin valora kaj fidinda persono.
- Pozitiva influo je via vivo. Via vivo ja estas influata de homoj kaj organizaĵoj kun kiuj vi estas en rilato. Konscie serĉi la ĝustajn retojn kaj lasi la ĝustajn personojn eniri vian reton, havos pozitivan influon.

Dank’al la ekflorado de interreto, nova, forte kreskanta fenomeno ekzistas, t.e. retpaĝar-oj kie vi celkonscie povas reti. Ekzemple ekzistas sociaj komercaj komunumoj kiel Ecademy, Ryze kaj OpenBC, same kiel interretaj komercaj direktorioj kiel LinkedIn, Spoke aŭ Zerodegrees.

LinkedIn havas kvin milionojn da membroj, originas el Usono kaj reprezentas 130 industrifakojn. OpenBC originas de Germanio, havas nun unu milionon da membroj, funkcias en 16 lingvoj kaj troveblas en 200 landoj. Ecademy estas fondita en 1998 en Britio, nuntempe nombras pli ol 70.000 kaj havas la ambicion iĝi la plej granda.

De ĉi triopo Ecademy estas la plej socia. La reciprokaj rilatoj ofte estas forte personaj, kio ankoraŭ estas intensigita pro la regule organizataj kunvenoj ekster la interreto. Ĉiu membro faras en la retpaĝaro profilon pri si mem, ĉe kiu la akcento kuŝas je kiu vi estas, ne je tio kion vi profesie ofertas. Certe ne estas la intenco meti vian vivokarieron, tiel kiel oni faras ekzemple ĉe LinkedIn. Se vi enmetas viajn “50 vortojn”, per kiuj vi diras la esencon pri vi mem, vi ankaŭ pligrandigas la eblecon trovi samideanojn. Aldonu ekzemple 'Esperanto' kaj - klakante sur la vorto - vi tuj trovas ĉiujn kiuj faris la samon.

La prezidanto kaj kunfondinto Thomas Power donas en sia profilo la sekvajn valorojn kiuj gravas por Ecademy:

- gajni per dividi
- aperteco
- sincereco
- sagaceco
- amikeco kaj afineco
- unu granda familio – la kamaradeco de Ecademy
- helpi unu la alian, sen preni kaj neniam redemandi ion – en aliaj vortoj ĉiam kontribui al la reto kaj aliaj personoj
- ne zorgi pri: “kio enestas por mi?”
- konekteco kaj afino – la malnova ĉina kredo konata kiel GuanXi
- konekti homojn por kio ili serĉas, serĉi por ili tiun laboron, tiun klienton, tiun liveranton, tiun direkton, tiun vivon.

Ecademy forte emfazas bonan ekvilibron inter emocia kaj financa prospero. Elirpunkto estas ke por esti sukcesa en komercaj aferoj unue la emocia flanko de via vivo devas esti en ordo. Ecademy volas esti helpilo. Kiel vi atingas tion? Per kontribuadi. Ecademy estas reto bazita sur kontribuoj de la membroj. Ju pli vi enmetas, des pli vi elprenas.

Esperantoklubo je Ecademy

Kiel ĉe UEA oni havas la diversajn asociojn (landajn, lokajn, fakajn), tiel ĉe Ecademy oni havas la klubojn. Ĉiu membro povas fondi klubon, jes aŭ ne kun komercaj celoj. Je la 11a decembro 2005 Rob Ebenaŭ fondis la klubon ESPERANTO. La hejmpaĝo mencias la jenajn celojn: *[sekvo je p. 10]*



En la papera versio je p. 8-9 estas la spezokonto kaj bilanco pri 2005.
Por vidi ilin en la reta versio, klaku http://users.pandora.be/ikef/lm91_bilanco2005.pdf.

- Informi la membrojn de Ecademy pri la ekzisto kaj utilo de Esperanto.
- Informi esperantistojn pri la ekzisto kaj utilo de Ecademy.
- Kunigi ilin, amuziĝi, interŝanĝi informojn kaj komerci.

Intertempe la klubo havas dekon da membroj – ĉefe Ecademy-devenaj. La uzitaj lingvoj estas kaj angla kaj Esperanto. Nuntempe ni ĉefe bezonas membrojn el la Esperanto-movado, por rebonigi la ekvilibron inter la Ecademy-anoj kaj esperantistoj. Por esti sukcesaj kiel klubo ni devos montri ke Esperanto povas funkcii ene de Ecademy. Aliflanke de Ecademy estas ofertataj al vi kaj via firmao:

- fidindaj komercaj kontaktoj
- reklamo por via firmao en la tuta mondo
- dungitoj, partneroj, liverantoj kaj klientoj
- aliro al retkunvenoj en la tuta mondo
- unikaj iloj por konstrui kaj administri vian reton
- konstruado de bona reputacio rilate al viaj spertoj kaj konatuloj
- helpo kaj konsiloj de miloj da profesiaj komercistoj
- hono, konatuloj kaj kontraktoj

Estas senpaga baza membreco kiu i.a. ebligas vin membriĝi de unu klubo, ricevi novaĵleterojn, fari profilon, partopreni en kunvenoj kaj traserĉi la reton por kolekti konon. Por pli vastaj eblecoj oni petas kontribuon. Por pli da informoj kaj por aliĝi vi sekvu la jenan ligon:
http://www.ecademy.com/account.php?op=signup&c=3200&xref=89229

Post via aliĝo vi aŭtomate estos membro de la Esperantoklubo. La unuajn du semajnojn vi estos gastmembro. Tio donas al vi la eblecojn de 'Power networker' (Forta retulo), tiel ke vi povas ekkoni ĉiujn eblecojn de Ecademy. Poste vi decidas ĉu vi volas pagi por tiu ĉi sistemo aŭ ne. Iom da kono de la angla ja estas dezirinda, ĉar tiu aliĝpaĝo (ankoraŭ) ne estas en Esperanto. Ni zorgu ke tiom da esperantistoj membriĝas tiel ke iĝas interese traduki la paĝojn ankaŭ al Esperanto.

Por pli da informoj vi povas kontakti Rob Ebenaŭ, rete Rob(a)cdline.be. Tel. +32 3 633 15 35. Skype: roeben2934.

*Fontoj: Ecademy kaj www.networking-coach.com*

Sepa Internacia Konferenco pri Minada Historio (IMHC 2006) okazos de la 12a ĝis la 15a de oktobro 2006 en Beringen, Belgio. Kvankam Esperanto ne estos inter la laborlingvoj, informoj en Esperanto baldaŭ legeblos je www.miningheritage.org.

**Serbio**

Kiel komenci propran laboron

En Serbio jam agas sufiĉe da bankoj, ĉu eksterlandaj ĉu naciaj, kaj ĉiuj donas plej diversajn kreditojn por plej diversaj aferoj kaj aĉetadoj.

Al la kredita laboro aliĝis ankaŭ la Nacia agentejo por dungado. Celo de la dungaj kreditoj estas laborigo de la homoj, t.e. kreado de novaj laborlokoj per financado de la elektitaj laborprojektoj de la senlaboruloj. Do, por povi konkursi por la monrimedoj la unuopulo devas esti senlaborulo registrita ĉe la agentejo, havi bonan labor-ideon kaj preparitan financan planon kun devigo registri firmaon por proponita laboro kaj pagadi regulajn obolojn dum du jaroj.

Sufiĉe da homoj interesiĝas ankaŭ por tiuj ĉi kreditoj. Multaj pretigis la laborprojektojn kaj konkursis. Ne ĉiuj, sed tamen sufiĉe da ili ja pasas. Jen propraj spertoj de unu el la sukcesaj projekt-kreintoj. Li ricevis krediton en aŭgusto 2004 por ideo-projekto "Konstruado de muntitaj domoj".

"Dum jaroj mi perlaboradis je diversaj konstru-laboroj, sed sen ajna konstanta posteni-go. La jaroj pasadis kaj mi komencis pensadi pri la dungo-jaroj kaj pensio. Sed mi ankoraŭ ne havis mian loĝejon, mi estis subluanto kaj mi ne emis krei novajn mon-devigojn kiujn kaŭzus registro de firmao. Feliĉe, mi solvis mian loĝ-problemon konstruinte por mi mem malgrandan muntan domon kaj de tiam mi povis monatan lu-monon anstataŭ por la luado enpagadi al la pensifonduso.

Krome, aperis la ebleco pruntepreni aldonan monon. Tamen en la Nacia agentejo por dungado oni diris al mi ke mi bone pripensu antaŭ ol mi prenu la krediton, ĉar la kredito ne estas tiel taŭga: oni devas redoni preskaŭ duoblan monsumon pro la devigaj enpagoj por la pensifonduso. Sed mi ne komprenis tiun devon tielmaniere. Ja mi ne planis enpagadi la pensikontribuon nur dum la du kredit-devigaj jaroj, sed ankaŭ dum venontaj tridek du jaroj, ekzemple. La prunteprenitan monon - ĉ. 1000 eŭrojn - mi kalkulis kiel donacon kiu helpos min je komenco, ĉar mi jam estas sperta je tiu ĉi laboro kaj mi jam havas la veturilon kaj sufiĉe da bezonataj ilaroj.

La monricevo kaj registro de la firmao okazis preskaŭ fine de la konstrusezono, kio zorgigis min. Sed la ekpenso ke mi fine komencas labori tute leĝe, ke de nun mi ja havas iun certecon, kaj kompreneble ankaŭ pli grandan respondecon, estis sufiĉa por daŭrigi la agadon. Aldona motivo estis la fakto ke en Serbio ankoraŭ ne multaj firmaoj okupiĝas pri la konstruado de la muntitaj domoj kaj ke, se mi laboros kvalite kun



kvalitaj materialoj, ankaŭ por mia firmao oni trovos laboron. Ĉar la ligno estas baza materialo por konstruado de muntitaj domoj, la ricevitajn mon-rimedojn mi investis en konstruado de mini-lignosekigejo kaj platformo sur kiu oni muntas ĉefajn elementojn. La muntitajn elementojn oni poste transportas al la konstruloko.

Post la registro de la firmao mi komencis aperigi anoncojn en la taggazetoj kaj sufiĉe rapide eventualaj investantoj komencis telefonvoki min, sed ĉiuj, mi devas konfesi, suspektplenaj. Tamen, ekzemplo de mia propra muntita domo helpis min je interkon-sentado de mia unua laboro. Ĝis nun, dum la unua laborjaro, mi konstruis ses domojn. Mi estas kontenta pri ĝisnuna rezulto. Ja mi fine okupiĝas pri leĝa propra laboro kaj mi sukcesas plenumi la kreditajn kondiĉojn. Krome, la komenca timo pro eventuala nesukceso jam malaperis."

Foiro de laborlokoj

La ŝtata Nacia agentejo por dungado en Serbio dum lastaj jaroj komencis uzi novajn formojn por helpi al la senlaboruloj trovi laboron.

Ankaŭ la ŝtato dum la lasta tempo pli aktive kaj pli konkrete helpas la dung-agentejon. Fakte tio ĉi ja estas kompreneble, ĉar la ŝtato ankaŭ havas intereson kaj celon malgran-digi nombron de la senlaboruloj, kiu lasttempe pligrandiĝis. Nome, kun ŝanĝo de la merkatsistemo, laborsistemo kaj laborleĝoj, kaj privatigo de la ŝtataj entreprenoj, sufiĉe da entreprenoj estis devigitaj malgrandigi la nombron de la laboristoj. Krome, parto de la jam privatigitaj firmaoj eĉ ĉesis labori, kaj ties laboristoj restis sen laboro.

Nun la dung-agentejo organizas ankaŭ edukad-kursojn por ebligi al la ekslaboristoj plibonigi aŭ eĉ tute ŝanĝi siajn laborspertojn. Tamen, por iom pli aĝaj laboristoj estas tute nekutime kaj strange ke ili je aĝo de 40-50 jaroj restis sen laboro. Por la merkata merkato ja tio ĉi estas sufiĉe kutima situacio kiam la tuta firmao pereas... sed homoj ĉi tie, aparte laboristoj, ja dum kvindeko da jaroj estis alkutimigataj je tute aliaj laborkondiĉoj. Do, nun oni devas re-edukadi la homojn (laboristojn) ke ne nur ke eblas perdi la laboron, sed ankaŭ ke eĉ ofta ŝanĝado de la labor-firmaoj eblas. La edukad-seminarioj estas unu el la aktivecoj de la dung-agentejo.

Por senlaboruloj, kiuj jam akceptis la novajn laborkondiĉojn oni ofertas ankaŭ novajn eblecojn por trovi aŭ krei laboron. Kreditoj estas donataj por komenci propran laboron kaj por registri propran firmaon. La senlaborulo devas verki la laborplanon kun detala financa plano. Se la laborplano aspektas sufiĉe reala kaj farebla al la mondonantoj, la kreinto de la plano sub certaj kondiĉoj ricevos monon (krediton) por komenci realiga-don de siaj ideoj.

Multaj bankoj ankaŭ donas ĉi tipajn kreditojn. Do, per bonaj laborideoj oni povas konkursi ankaŭ ĉe la bankoj.

Ankoraŭ unu netipa maniero de la agado de la Nacia agentejo por dungado aperis antaŭ nelonge: Foiro de laboro. Kutima labormaniero de la Nacia dung-agentejo estas ke ĝi havas bazon de ĉiuj senlaboruloj (kiuj ja anonciĝis) kaj kiam iu firmao bezonas novajn laboristojn ĝi kontaktas la dung-agentejon, kaj la agentejo el sia bazo kontaktas taŭgajn personojn laŭ la edukaj spertoj. En Niŝ jam la duan fojon okazis "labor-foiro". La dung-agentejo organizis por la firmaoj kiuj bezonas novajn laboristojn publikan prezentadon - "foiron" - al kiuj venas la senlaboruloj kaj nun ili elektas inter la ofertitaj firmaoj... kaj la firmaoj estas tiuj kiuj "atendas sian sorton"... Preskaŭ ideala situacio por la senlaboruloj, ĉu ne? Sed ne ĉio estas tiel ideale: la kvanto de la ofertitaj liberaj lokoj ankoraŭ ne estas tiel granda. La lastan "labor-foiron" partoprenis nur dekon da firmaoj kiuj averaĝe bezonis 2-3 laboristojn. Entute, ni diru, tridekon da novaj liberaj laborlokoj estis ofertitaj al publiko de almenaŭ 1000 personoj kiuj dum la tago vizitis la foiron... Oni kalkulas ke en niŝa regiono estas pli ol 15.000 senlaboruloj....

ZC

**Anoncitaj aranĝoj**

Titolo: Kantona Oro-Renkontiĝo (Koro)

Dato: 25-30 Aprilo 2006 okaze de 99a China Foiro en Kantono, Chinio.
Je redaktofino mankis aktualaj informoj; interesitoj kontaktu chielismo(a)yahoo.com.cn.

58a IFEF-Kongreso en Shanghai, Ĉinio

Datoj: 6a-13a de majo 2006, postkongreso: 13a-17a de majo 2006. S-ro Wang Ruixiang, P. O. Kesto 825, CN-100037 Beijing Ĉinio, aŭ S-ro Han Zuwu, Wan Xin Cun 5-21-1-501, Hedong Qu, CN-300142 Tianjin, tel. 86 10 68326682, 86 10 68321808, 86 22 24375557, retpoŝto: lamondo(a)163.com, hanzuwu(a)eyou.com.

4-a Eŭropa Medicina Esperanto-Kongreso (4a EMEK)

okazos inter la 22-a kaj 26-a de julio 2006 en urbo Hodmezovasarhely (Hungario). Aliĝilojn kaj informojn oni povas peti de S-ino Katarina Farago, HU-6801 Hodmezovasarhely, Pf. 89. Hungario, retadreso: farago.kata(a)espmed.hu, aŭ 4a.emek(a)espmed.hu. Prelegojn anoncu ĉe D-ro Imre Ferenczy, iferdr(a)t-online.hu.



**Komercaj petoj kaj proponoj**

Brazilo

La firmao "Filmoj Imagu" estas ĵus fondita kaj atendas la oficialigon en Brazilo. La fondintoj estas Joe Bazilio Costa kaj Karen Pereira, Rua Gal. Carneiro, 246-A, 35570-000 - Formiga - MG - Brazilo. Post unua prov-filmeto (14-minuta) bazita je ĉina rakonto de la libro Oranĝa Ombrelo oni decidis iri al pli ambiaciaj projektoj. Korespondu kun: amiko(a)uai.com.br kaj imagu(a)uai.com.br.

Ĉinio

De ĉi-jaro, en Ĉinio eduka entrepreno, posedanta ĝeneralajn infanĝardenojn, gvidata de esperantistoj volas realigi la jenan planon:
engaĝi/inviti fremdlandajn instruistojn, kiuj povas instrui anglan lingvon al ĉinaj infanoj (se ili estus ankaŭ esperantistoj,tre bone, se ne, tio ne gravas; ni celas praktiki la kunlaboron kunlaborante kun fremdaj esperantistoj kaj E-organizoj per/por Esperanto). Ni laŭplane estas sinsekve establantaj pli da infan-ĝardenoj en la tuta Ĉinio. Informoj: Hefei Verdstelo Esplora Instituto pri Turismo, s-ro Liu Jianguo, retadreso: yjs00815(a)mail.hf.ah.cn. Telefono/fakso: 0086-551-4484370.

**Planita: Jura Vortaro**

Mi mallonge volas informi vin pri tute nova projekto - Jura Vortaro - kiu naskiĝis danke al la iniciatoroj Remush kaj Renato. Mi estas Otmar el Aŭstrio kaj momente studento pri juroscienco en la universitato en Linz. Mi kunestros tiun projekton.

Por detale diskuti pri tiu projekto ni instalis novan diskutgrupon. Vi povas aliĝi sendante sentekstan mesaĝon al la adreso jura-vortaro-subscribe(a)yahoogroupes.fr. Bv. informi nin per malmultaj vortoj pri via nomo, lando, eble aĝo, kaj kial vi volas aliĝi al tiu listo. Parto de tiu jura vortaro ankaŭ temos pri la Internacia Juro kaj kiel subparto de ĝi pri Juro de Eŭropa Unio. Ĉefe pri tio jam ekzistas multaj tradukoj kaj simple sufiĉas unue kolekti la diversajn jurajn terminojn uzitajn en la diversaj tekstoj kaj tradukoj.

Do, se vi interesiĝas pri tiu projekto, simple aliĝu al nia listo.

Kiu aliĝu al tiu grupo?

* juristoj, ĉar ili plej bone konu la signifon de la juraj esprimoj
* lingvistikistoj, kiuj povas helpi pri ĝeneralaj problemoj koncernante terminojn

* komercistoj, ĉar la unua celo de tiu vortaro estu la subteno de la internacia komerco per Esperanto
* personoj, kiuj interesiĝas pri Eŭropa Unio, kiu jam multege tradukis pri tiu temo
* personoj interesiĝantaj pri aliaj juraj temoj,
* eldonisto, kiu eble pretos eldoni tiun vortaron
* kaj ĉiuj aliaj, kiuj simple interesiĝas pri tiu projekto "Jura Vortaro"

Korajn dankon,

otmar.liebhart(a)esperanto.at

**La Stelo**

Hazarde mi legis en la revuo 'Monato' de majo 2005/5 la interesan artikolon pri la 'stelo' (ankaŭ aperintan kiel kroman numeron 81 de 'La Merkato', julio 2003) kaj mi volas kontribui al eventuala debato pri la temo.

La intenco krei monunuon ŝirmitan al inflacio ne sukcesis, tio montriĝis esti nur revo. Tia monunuo ne ekzistas. Ankaŭ la stelo ne faris ekcepton. Fakte ĝi estiĝis kun ligaĵo al nederlanda monunuo, laŭ la ekvacio 'unu stelo egalas je kvarono de guldeno', kiu evidente ne estis konstantvalora. Kurzrilato de la stelo en ceteraj landoj devenis el la kurzotabelo de la guldeno kuranta en Nederlando.

Poste, probable pro la perdo de la aĉetopovo de la stelo/guldeno, oni ŝangis la valoron de la stelo al duona guldeno; eble, mi opinias, ĉar la pano, kiu en la jaro 1946 kostis kvaronan guldenon, en 1977 kostis la duoblon. Do, tion ne kunportis laŭ mi manko de ligiteco al prezo de la pano, sed, male, tia ligiteco plurestis.

Ĉiam surbaze de la lasta valoro de la stelo (duono de guldeno) oni povas eltiri ĝian valoron en eŭrojn laŭ la ekvacio, fiksita por guldeno kiam la eŭro naskiĝis (2002/1/1), tio estas 'unu eŭro egalas al 2,20371 guldenoj'. Pro tio, unu eŭro egalus, se mi ne eraras, al 4,40742 steloj, sekve unu stelo egalus nun al 0,22689 eŭroj; kaj kurzrilato de la stelo en landoj ekster la eŭro-areo estus, sammaniere kiel antaŭe pri guldeno, kurztabelo de eŭro.

Konklude, oni povus denove monfarigi 'stelojn' sed nur por plezuro de numismatoj. La valoro de la moneroj evidente ne devus subesti la koston de monfarado. Tiucele oni povus serĉi iun azian monfarejon okaze de universala kongreso en tiu mondoparto.

Carlo Masella. (c_masella(a)virgilio.it)



Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

*"Kiam antaŭ duo da jaroj mi volis konvinki kelkajn kolegojn-lingvistojn, ke Esperanto estas plene vivanta lingvo, mi aĉetis por ili abonojn al MONATO. La efiko estis ĝuste tia, kian mi deziris: ili traktis tiun revuon kiel tute normalan fenomenon de tute normala kaj funkcianta lingvo. MONATO estas nia* Newsweek, *nia* Spiegel, *kaj ĝi brile kaj ĉiam interese plenumas tiun rolon."*

*Humphrey TONKIN*

www.monato.net